



Informoj:  
Arto -:- Literaturo  
Turismo -:- Sciigoj

# NIA VIVO

Administracio  
kaj Redakcio:  
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

## AL NIAJ LEGANTOJ

Vi ĉiuj sendube jam konstatis, ke NIA VIVO ekde la unua numero ĉiam uzis nur la Esperantan lingvon. Tion ni promesis kaj intencas, uzi nur Esperanton, kunhelpante tiel per nia modesta laboro al la disvastigo de l' komuna lingvo.

Tamen ni nun faras escepton de tiu regulo por publikigi du hispanlingvajn tradukojn, nun tiun de «La Espero» kaj en alia numero tiun de «La Vojo». Ambaŭ belegajn poeziojn de Zamenhof majstre hispanigis nia kunsocietano kaj kara amiko, la eminenta esperantisto S-ro Inglada, al kiu ni ŝuldas tiom da bonajoj.

Ni profunde lin dankas por tiu nova pruvo de estimo al NIA VIVO, kaj estas tute certa, ke niaj legantoj ne nur senkulpigis la escepton, kiun ni faras, sed ili ankaŭ kun ni dankos kaj partoprenos la honoron kiun NIA VIVO sentas, pro lo motivo, kiu nin devigas flankenlasi nian promeson.

## LA ESPERANZA

Un nuevo sentimiento vino al mundo  
Y al hombre llama con potente afán.  
¡Oh, si en las alas de apacible viento  
Volara al punto de uno a otro lugar!  
No va en busca del hombre, cual la espada  
Que la sangre se goza en derramar,  
Al mundo que combate eternamente  
Le ofrece en don sagrado la amistad.  
A la santa señal de la esperanza  
Se agrupan los guerreros de la paz,  
Y la intensa labor de los que esperan  
Hace a la empresa rápida avanzar.  
Fuertes se alzan los muros milenarios,  
Que los pueblos dividen al azar,  
Mas demolidas por amor sagrado  
Las tenaces murallas caerán.  
La mutua comprensión entre los pueblos,  
Basada en un lenguaje universal,  
Hará de ellos la gran familia humana,  
Que de común acuerdo se unirá.  
Y nuestros diligentes compañeros  
En su amante labor no cesarán,  
Hasta que el bello sueño de los hombres  
Se convierta en bendita realidad.

L.-L. ZAMENHOF.  
Traducción libre castellana de  
VICENTE INGLADA.

## LA JAPANA PROPRA MATEMATIKO

(Daŭrigo)

(La Enhavo)

Mi priskribis ĝis nun plej simple pri la historio de la japana propra matematiko aŭ «Ŭasan». Mi do de nun devas, kompreneble kompendie, klarigi pri la enhavo.

A) Ŭasanistoj studis pri integralnombraro.

B) Pri algebro mi jam antaŭe iom priparolis, sed mi klarigas la konkretan metodon pri la solvado de ekvacio. Ŭasanistoj povis sciigi proksimuman valoron de radikoj de ekvacio per la jena operacio.

a) Fari ekvacion, kiu enhavas multajn kvantojn nesciitajn aŭ radikojn.

b) Elimini la aliajn tutajn nesciitajn kvantojn krom la speciala unu.

c) Sciigi per la helpo de unuspeca kalkulilo «Samboku» la proksimuman valoron de la neeliminita radikoj, aplikinte la metodon, kiu tute similas al la Hornera metodo. Ili studis pri ankaŭ nedifinita ekvacio.

C) Geometria operacio tre bone progresis kaj Ŭasanistoj estis sukcesontaj konstrui la unuspecan geometrian sistemon. Vi do tuj povus imagi al vi per la jena fakto, kiel ili povis studi altklasajn objekton.

a) Ili difinis elipson tute purgeometrie kaj ĝin tre bone povis aluzi.

b) Ili sciis la problemon pri la ses tanĝantoj de kvar cirkloj tanĝanta je unu cirklo, aŭ la teoremon de Casey. La elpenso de la problemo estis farita pli frue ol tiu de Casey; kaj ili uzante la problemon elpensis la metodon, kiu respondas al «La metodo de inverso». Cetere post tia studo ili fine povis atingi la ideon de abstrakta komuna tanĝanto.

Ĉ) Ili studis ankaŭ pri trigonometrio sen la neceseco de astronomio; kvankam oni diras, ke trigonometrio devenis de la neceseco de astronomio en Eŭropo.

D) La glora merito de Ŭasanistoj, mi emfazas, estas la elpenso kaj la disvolviĝo de la teorio

«Enri». Tiu ĉi respondas, kiel mi jam antaŭe klarigis, al la nuntempa integralkalkulo. Diferencialo ne estas trovebla en ilia studado, sed oni povas kompreneble sciigi integralan valoron sen diferencialo. Ili studis per la teorio «Enri» pri la diversaj interrilatoj de du konusoj, la longeco de arbitra kurbo, volumeno ktp.; kaj tiele ilia studado estas tute mirinda en sia supere progresinta formo.

(La Konkludo)

Nuntempe ni ĉefe lernas la okcidentan tre oportunan matematikon, kiu venkis la japanan propran matematiko «Ŭasan». Kial do la matematiko «Ŭasan» malaperis venkita de la okcidenta, malgraŭ ke ĝi progresis en la formo de iom granda logika konstruaĵo? La kaŭzojn ni devas esplori kaj sciigi la veron! Mi pensas, ke la kaŭzoj estas la jenaj.

1) La signoj de la matematiko estas pli maloportunaj, ol tiuj de la okcidenta. Tio ĉi estas la plej granda kaŭzo, mi pensas.

2) Ĝi ne povis sufiĉe progresi pro la jenaj malbonaj kondiĉoj.

a) Al ĝi mankis la stimulo de astronomio kaj fiziko, kiuj devas esti ĝiaj bonaj kunuloj aŭ helpantoj. (Mi skribus, se vi volas, pri la problemo, kial en nia lando ne kreskis astronomio).

b) Inter Ŭasanistoj mankis sufiĉe da intima kooperero. Alivorte ili havis la emon kaŝadi reciproke iliajn originale elpensitojn pruvmetodojn kiel sekretaĵojn. Necesega estas la sufiĉa kooperero kompreneble por la agado progresigi sciencon!

c) Ĝi estis studita nur en la daŭro de ĉirkaŭ ducent jaroj; kaj estis ju pli malbone, ke en tiuj jaroj japanoj estis preskaŭ absolute mutaj kaj blindaj al fremdlandoj. Pro tio ili ne povis importi utilajn metodojn el ekstelandoj por levi sian studadon. Kial do ili estis tiel fremdaj al ekstelandoj?

Tio ĉi estas la rezultato de la tiutempa politiko, kiu severe malpermesis la rilaton inter enlandanaj kaj eksteraj pro la timo de enlanda disvastiĝo de Kristanismo.

Cetere la matematiko «Ŭasan» estis studita de tre malmultaj homoj, ĉar la tiutempa registaro ne donis la eblon de lernado al popolamaso. Tial mi ankaŭ ĉi tie povas diri, kiel grandmezure influas politiko al la progreso de scienco. Eĉ en la hodiaŭa tempo, vi akrevidaj legantoj ekkonus ke ekzistas du grandaj potencaj fortoj, kiuj baras la progreson de scienco. Kompreneble ili ja estas la ekonomia problemo kaj la fakto, ke la homaro nur uzas malsamajn lingvojn. Ni sendube devas penadi por disfaligi la suprediritajn grandajn barojn, almenaŭ se ni sincere deziras la leviĝon de l' homaro.

Krom ĉi tiuj estus aliaj ceteraj gravaj kaŭzoj, sed mi ĉesas ilin prezenti. Mi volas tamen aldoni almenaŭ la jenan fakton. T. e. japanoj, kiuj jam elstudis la okcidentan matematikon, nun montras grandan talenton kaj originalecon. Jam estas multe da japanaj mondfamaj matematikistoj kaj ni povas esti fieraj en tiu punkto, ke ili ĉefe konstruis preskaŭ ĉiujn modernajn partojn de la teorio pri la ovalaj kurboj, kio estas unu parto de l' nuntempa moderna matematiko.

En la fino mi havas la honoron prezenti al vi S-ron Joŝiŭo Mikami, unu el la plej grandaj aŭtoritatoj pri la matematiko «Ŭasan» kaj la liajn jenajn librojn korcerne al la matematiko.

1) D. E. Smith and Y. Mikami, A. History of Japanese Mathematics. Chicago, 1914.

2) Y. Mikami, Development of Mathematics in China and Japan. Leipzig, 1913.

Mi tiele finas mian tezeton kaj mi estos tre feliĉa, se vi multe interesiĝos je ĉi tio, kvankam mi timas, ke ĉi tio estus malfacile komprenebla al vi, kiuj eble ne scius pri la historio de mia lando.

Kaj mi ne forgesas en la fino esprimi mian plej grandan, elkoran dankon por via afabla akcepto je ĉi tiu al «Frateco», kiu nun penadas kun la tre bona sistema rimedo kaj grandega fervoreco por nia sankte benita movado, kaj samtempe al F-ino Pilar Salvo, kiu tute bonkore transdonis ĉi tiun mian tezeton al Zaragoza Esp-a Societo, «Frateco».

Micuŭo Noguĉi.

## LERNI LUDANTE

La infano ludas kun aliaj infanoj. Lia patro venas el la strato kaj vidas sian filon kaj deprenas el la ludo la infanon por lin kisi, kiu poste reiras sian ludon.

La patro tuj akceptas amikon kun kiu parolas kaj la infano proksimiĝas al ambaŭ kaj diras al sia patro ion en Esperanta lingvo. La patro respondas sammaniere.

La amiko miras vidante, ke la malgranda infano scias jam la internacian lingvon.

La patro diras al sia kara amiko, ke lia filo lernas ĉi tiun lingvon ĉar estas la celo por atingi, ke la homaro estu granda rondo familia kaj tiam ĉiuj homoj estos fratoj sen baroj de malsamaj lingvoj kaj la homoj de ĉiuj ideoj estos kunigitaj per la internacia lingvo Esperanto, kiu portos al homaro iom da feliĉeco.

Kaj mia filo lernas Esperanton sen trudo sed ludante.

Li havas en mi sian bonegan amikon kaj ludante, ŝercante, mi diras al li vortojn esperantistajn, kiujn li lernas tiel sen klopodo.

La ludo estas la plej grava laboro por la infano, sed tamen ludante li povas lerni

Kaj ne nur ĝi estas utila sed nepre necesa se ni volas, ke la frateco inter la homoj estu realaĵo.

Ĉiuj esperantistoj ne nur devas evidentigi sian amon al Esperanto lernante ĝin sed ankaŭ devas esti la profesoroj de siaj gefiloj.

JOZEFO DOMEQUE.

Orés (Zaragoza).

Jen alia lernanto nia per poŝto en kiu ni divenis tuj grandan pioniron por nia Esperanto kaj estonta lerta esperantisto. Ni klarigis al S-ro Domeque dekdu aŭ dekkvin perpoŝtajn lecionojn kaj li ĵus fininte la teorion sendas al ni sian unuan praktikajon. De la komenco de sia esperantista vivo S-ro Domeque, en la malgranda vilaĝeto, kies li estas nacia instruisto, vigle helpis nian movadon. Li verkis kelkajn artikolojn pri Esperanto en la pedagogia bulteno «El Magisterio Aragonés» kaj anigis al «Frateco» kun estiminda jarkotizo. Karega Domeque, kvankam ni ne konas vin, vi havas nian plej grandan estimon. Ricevu pere de NIA VIVO koran brakpremon de la tutmonda esperantistaro.

Daŭrigu, daŭrigu en tia vojo...

## SONETO

La edzo de virin' juna kaj bela,  
kion serĉadas ĉe virin' alia?

Ĉu estas malpli blanka virin' lia?  
Ĉu ŝi estas maldanka, malfidela?

Ĉu ŝi estas maldolĉa? Ne, miela.  
Ĉu ŝi estas malvarma? Ne, pasia.  
Ŝi estas ja Venus, siren' gracia,  
lilio blanka, rozo tute hela.

Do kion li serĉadas kun obstino?  
ĉu pli belajn virinojn renkontadi?  
aŭ lia serĉo restos ne finita?

Verdire li ne serĉas pri virino,  
li serĉas la laboron ŝin serĉadi:  
tio estas l' afero plej incita.

FRANCISCO DE QUEVEDO (1580-1645).

El hispana lingvo tradukis

JAIME GRAU CASAS, L. K.

## GESAMIDEANOJI

Vi estas esperantisto, vi estas devigata disvastigi nian amatan esperantan lingvon, do portu ĉiam sur via brusto la verdan signon, ĉiam portu ĝin!

Oni ofte diras, kiam oni vidas verdan stelon sur esperanta koro:

—Tiu estas «ĉalao» (hispana popola vorto, kiu signifas maniulo).

Sed ekzemple, se sinjoro, kiu nin nomas «ĉalao» iras por aĉeti en la butikoj kaj en ĉiu el ili li vidas nur unu vendiston, kiu portas verdan signon, li iras en la teatron aŭ en kinejon kaj ankaŭ tie trovas verdajn signojn kaj en ĉiu ajn loko, kien li iras estas esperantistoj, la «ĉalaoj» viditaj dum la tuta tago estos multenombraj kaj ĉar, kiel diras antikva hispana diraĵo: «kiu iras apud lamulo, lamas», tiu sinjoro ankaŭ fariĝos «ĉalao», kiel ni.

Estas facila propagando.

PILAR SALVO GONZÁLEZ.

## SCIIGOJ

*Nia Esperanta Laboro.*—La unua «Rondo Frateco» sukcese daŭrigas sian gravan esperantistan agadon. Kiam ni havos sufiĉajn petojn por starigi alian, ni tion faros sed ĝi ne estos la «dua» ĉar la Dua jam komencis ankaŭ labori. Tamen tiu ĉi nova «rondo» estas iom speciala. Ĝi konsistas nur el kelkaj ekslernantoj niaj per poŝto kiuj estas Naciaj Instruistoj. La Rondo estas estrata de S-ro Vicente Perles, Nacia Instruisto de Aguaron.

Ni atentigas niajn legatojn pri tiu nia lingva laboro.

«Frateco» opinias, ke la plej grava tasko estas enigi nian duan lingvon en la lernejojn kaj sendube, por tio, la komenco estas esperantigi instruistojn. Tial ni, antaŭ tri jaroj, komencis niajn perpoŝtajn klarigadojn. Sesdek du naciaj instruistoj estis disciploj niaj per poŝto. Kompreneble ne ĉiuj elfariĝis esperantistoj sed jes la sufiĉa nombro kaj sufiĉe bonaj por, ke ni estu plene kontentaj pro tiu agado, kiun ni daŭrigos. Kelkaj el niaj lernantoj jam starigis en sia lernejo grupojn de esperantistaj etuloj kiuj morgaŭ estos plenaĝuloj...

\*\*\*

*Radio Valencia.*—De la 21.<sup>a</sup> de la monato aprilo, ĉiun jaŭdon je la naŭa kaj kvin minutoj vespere, tiu radio dissendos esperantistan propagadon. Ni petegas al ĉiuj kiuj aŭdos tiujn dissendaĵojn ke ili bonvolu danki S-ron Direktoron de Unión Radio Valencia por tiu grava helpo al Esperanto.

\*\*\*

*Hispana Antologio.*—Ni ricevis artikolon de S-ro Grau Casas pri tiu grava verko. Tial, ke la nuna numero estis jam preskaŭ presita kiam ni ricevis la verkon de S-ro Grau, ni ne povas publikigi ĝin.

Sed la afero estas tre interesa kaj pro tio ni antaŭdiras ke S-ro Grau havas multajn verkajojn jam koletitaj kaj deziras ke ĉiu sperta esperantisto helpu lin en la traduko de prozaĵoj de la plej famaj hispanverkistoj. Ni konsilas tiun helpon ĉar

vere la entrepreno de kuin S-ro Grau prenas sur sin estas inda je ĉia apogo. Jen la aŭtoroj, kies prozaĵojn li deziras: P. Baroja, P. Mata, A. Palacio Valdés, José M.<sup>a</sup> Pereda, B. Pérez Galdós, J. Valera, R. del Valle Inclán, V. Blasco Ibáñez y R. Pérez de Ayala. Bonvolu vin turni al S-ro Jaime Grau Casas, Urbeŝtraro de S. Quintí de Mediona (Barcelona).

### ĈE SORĈISTINOJ

Raporto travivita de S. de la Iglesia. Decembro 1.919<sup>a</sup>.

Tradukis el hispana lingvo, E. Bruquetas.

Dediĉaĵo.

Ĉar vi volas, ke mi inaŭguraci u vian albumon, jen estas tiu travivita raporto, tiu mallonga novelo, plej bone dirita, *kumpremita*, skizita, por, ke kiu havos tempon, humoron kaj Junecon skribu ĝin. Ke tiu aŭtografo de la maljuna kuracisto, kiu vidis vin naskiĝi taŭgos al vi kiel memorigaĵo, kiam li foriros por ne returni plu. Al alia krom vi, mi sendus frazon aŭ penson; al vi, kiu meritas pli, mi sendas epizodon de mia vivado.

S. DE LA IGLESIA.

\*\*\*

Ĉe sorĉistinoj.—La skeptikaj spiritoj, kiuj abondas en tiu ĉi jarcento de neadoj, racionalismoj kaj malpiaĵoj, neas, ke ekzistas sorĉistinoj. Certe, ili ekzistas! Mi jesas ĝin, animo malfermita al ĉiuj kredaĵoj, inklina al ĉiuj superstiĉoj. Jes, ekzistas sorĉistinoj; mi rilatis kun ia, majstrino pri diablaj artoj, eble, posteŭlino de ia el tiuj ses bruligitaj vivaj, aŭ el tiuj kvin bruligitaj en ostoj kaj statuoj en Logroño je 1.610<sup>a</sup>, aŭ eble, heredintino de la instruoj de granda doktorino je diablaj ensorĉaĵoj, Mario de Zozaya, kiu, ne estinte bela virino, sed jure abomeninte kaj konfesinte siajn malindajn rilatojn, kun tiu por ni nevidebla Satano, liberigis de brulado.

Ankaŭ ne estas neeble, ke ŝi estu parencino de tiuj komdamnitinoj en Santiago... sed por kio daŭrigi? Ke ĉiuj tiuj virinoj estis sorĉistinoj estas nedudeble, ĉar jesis tion kleraj teologoj, gravaj kasuistoj, ekleziaj eminentuloj, gloroj de nia lando; kaj tiuj virtaj kaj instruitaj viroj ne estus kondamnontaj je la eŝafodo kaj la flambrulado iajn malfeliĉajn frenezulinojn, ne antaŭkonstantinte tre konscience, ke tiu afero estis realaĵo kaj ne revita de senrespondaj histeriulinoj.

Sorĉistinoj ili estis kaj veraj sorĉistinoj, kiel ankaŭ estis mia amikino, mastrino Nemesia, kion mi pruvos en tiu ĉi raporto.

\*\*\*

Je la jaroj 1.873-74-75<sup>a</sup>, komence de mia profesia vivado, mi estis kuracisto de la granda distrikto kiu ampleksas tutan la bravan marbordon

de la «Prioiriñ'a» promontorio ĝis la bolanta maro «Cobas» kaj enhavas la abruptan kaj rokhavan montaron de «Pedroso». Laŭlonge de la vasta marlimo staras kelkaj centroj de loĝantaĵoj, malpli disjetitaj ol kutimas en nia lando. Domiños, S. Xurxo, Esmelle, Cobas, kalkulas kelkajn milojn da loĝantoj naskitaj kontakte kun Naturo kruda, inter la blekoj de maro preskaŭ la tutan jaron brueganta, kies eĥoj atingas, je silenta nokto, pli ol du mejloj.

El ĉiuj tiuj vilaĝetoj, neniu pli originala kaj kurioza ol «San Xurxo d'as Mariñas»; tio estas nur Galica pro la lingvo; oni dirus ĝin ŝirita el la marbordo de Normandio, lando de kaperistoj, adorantoj de marventega Dio, de la melankoliaj diaĵoj el Skandinavo al kiu levas iliajn petegojn por, ke ili havigu ŝipereojn; ilia vivo estas la morto, la doloro kaj la ruino de la malfeliĉaj navigantoj.

La tradicio parolas pri tio, ke «San Xurxo» estis rifuĝejo de iaj homoj de la Nordo (Normands), kruelegaj en iliaj bataladoj, bonaj amikoj de siaj protektantoj, kruelaj kaj sangavidaj kun la aliaj viroj, kiuj kunportis en siaj ŝipoj, armilojn kaj tranĉilojn de bonega kvalito, forte ebrigajn trinkaĵojn, ilarojn kaj aĵojn tre diversajn, transportante, ŝanĝe, peklitajn viandojn, fromaĝojn kaj buterojn, vinojn kaj grenojn. La ĉirkaŭiloj kaj plektobariloj ne estas faritaj per la galica moruso, sed per la orientaj agavoĵoj, kiuj je la flora tempo altigas iliajn skapoĵojn je ses aŭ pli da metrojn supren, kiel grandegaj kandelabroj, aldonante al la pejzaĝo aspektojn kaj nuancojn ne galicajn.

Kiel konsekvenco de la konstanta tributo kiun la maro liveras tie al la tero, estas ofte vidi tie riĉajn lignaĵojn, la mahagonon kaj la cedron, formante la kamparan liton, la manĝujon aŭ la pordon de l'budo de malriĉulo, kaj, ne estas malofte trovi sur la humila glasejo riĉan porcelanaĵon aŭ glason el delikata kristalo, kiuj nur povas deveni de ŝipruinoj.

Je la ektagiĝo post la noktaj marventegoj, antaŭ ol ektagiĝos, estas ofte vidi iujn palpebrumantajn punktojn, kiuj brilas ĉe la ombroj de la vasta marbordo. Ili estas la loĝantoj de «San Xurxo», kiuj serĉas la donacon de maro kaj kiuj antaŭ unu jaro, dum la torpedadoj de la Granda Milito, trovis la morton per la venenaj alkoholoj, kiujn la ondoj disjetis.

Pro tio kaj pro aliaj kaŭzoj, certe, antikvaj kaj legendaj, estas tiuj naivaj anaroj, malamataj de la loĝantoj de la najbaraj paroĥoj, kies unua insulta frazo, eljetita kiel sago en disputado, estas tia: «Malbenita sorĉistino! Satana filino!».

(Daŭrigota).